DERNA GRUNDADE 1832

IKST. AB.
ADS AB.
TADS AB.
MOTOR

A. B. C. CODE 5TH & 6TH ED.
LIEBERS CODE · BENTLEY'S CODE
BENTLEY'S SECOND · MARCONI
WESTERN UNION · RUD. MOSSE
PRIVATE CODE

SKÖVDE DEN (POSTFACK 113) 5 sept. 1946.

Herr Jan Strönne

Amiralsgatan 36,

M a l m ö.

Amiko,

Malmgren sendis al mi la aldonitan cirkuleron, kiun mi atente tralegis. Jes, ni esperu, ke finfine ni venu al vera akordigo en nia internacia movado poresperanta. Nur poste ni povas esperi je starigo de forta, aktiva kaj rezultodona per-esperanta laboro en diversaj medioj.

Kore mi dankas pro via invito al Dan-Sveda Tago en Lyngby. Fakte mi jam havas pasporton en ordo, sed... nur last-momente mi povas decidi. Supozeble mi devas rezigni, kaj pro manko da tempo kaj pro la kostoj.

Cetere mi povas raporti, ke mi nun disponas pri 625 adresoj je same multaj skoltaj korpusoj kun entute 28.810 membroj. Tamen estas nur Sveriges Scoutförbund. Restas ankoraŭ IOGT, NTO, KFUM,FA, sed pri ili ni zorgu venontjare. Kun Sthlmo mi interkonsentis pri papero, kovertoj kaj mendokartoj specialaj, sed ĉion ni pretigos tie ĉi. Fine mi sendos ĉion al Sthlomo por enpoŝtigo.

Saluton amikan